

La Espero

1975-3

Svenska Esperantotidningen

Fondita en 1913

FOTOUTSTÄLLNING I VÄSTERÅS



Västerås Esperantoklubb har nu ställt i ordning en ny liten utställning, som det också går an att få låna. Den "stora" utställningen som vi talat om tidigare är f.n. också ledig.

Vi har plåtat 18 klubbmedlemmar i hemma- eller gatumiljö. Bilderna har ganska stort format. Bredvid varje bild finns ett uttalande om esperanto, som vederbörande ansett sig kunna stå för. Exempel på ämnesområden: fred, språk och kultur, turism, radioamatörism, internationellt samarbete, brevväxling, meningsfull fritid, sjukvård, filateli. Det krävs faktiskt inte mycket utrymme för utställningen. Fotona kan hängas upp eller fästas på skärmar. Du kan komplettera utställningen med lokal information.

Tanken bakom den här utställningen är att låta helt vanliga människor bland

oss tala om, varför de satsar tid på esperanto. Med andra ord, vad man har för utbyte av att lära sig det.

Det finns olika åldersgrupper och yrken bland de 18. Praktikant, ingenjör, lärare, journalist, grundskoleelev, pensionär, sjuksköterska, arbetare...

Det har kostat en del och V. E. K. kan inte låna ut materialet helt gratis. Priset kan diskuteras allt efter omständigheterna.

Den här idén är mycket god. När man försöker intressera människor för esperanto möter man ofta invändningen: Ja, det är säkert en fin idé, men vad har människor i vår tid egentligen för nytta av esperanto?

Vi tycker du skall ta kontakt med Västerås Esperanto-Klubb, Soldatgatan 40, 723 45 Västerås, tel. 021/13 35 29.

A. B.

Sång- festivalens språk

När det svenska bidraget till sångfestivalen framförs på engelska är det varken en nationell yttring eller en internationell sådan utan snarare ett uttryck för vår undfallenhet inför den anglo-amerikanska kulturdominansen.

Att döma av festivalen är inflyttandet störst i Norden, samtliga länder därifrån använde som bekant engelska texter. De andra länderna, med undantag för Holland, visade prov på större självständighet och brukade sitt eget språk. Tyskland och Belgien flirtade förstås också med några engelska fraser i sina bidrag.

Språk och kultur hänger intimt samman och ett lands språk återspeglar mycket av folkens mentalitet och temperament. Exempelvis beror nog fransmäns ofta visade ovilja att tala engelska inte bara på nationell stolthet, deras generösa gestspråk blir helt enkelt malplacerat "på engelska".

Här i landet tycker vi att det är naturligt att man i italienska filmer talar italienska, i ryska filmer ryska o.s.v. och har genom att avstå från att dubba utländska filmer på ett fullödigare sätt kommit i kontakt med denna kulturform från många länder. Vi börjar också alltmer förstå hur viktigt det är att invandrare får behålla kontakten med sitt modersmål.

Denna beredvillighet är givetvis lovvärd, men rimmar illa med den anspråkslösa hållning vi ofta intar vad gäller vårt eget språk.

Språkligt utbyte är naturligtvis bra i och för sig, men ensidighet härvidlag tenderar att bli till en dominans som också påverkar andra kulturområden. Det finns inte bara alternativt musik. Det internationella språket — esperanto — är ett alternativt språk vid kontakt över språkgränserna. Dess politiska neutralitet och internationella kultur tillåter varje lands språk och kultur att fritt blomstra och utvecklas.

Att i schlagerfestivalen beröva publiken en bild av Europas mångfacetterade

språkarta är synd. Och använder man för bedömningens skull (vilket vid frågan hos arrangörerna sades vara skälet) annan nations språk så måste det bero på att sångfestivalen fått ett annat syfte än det ursprungliga: att visa nationella varianter på temat: nya melodier.

Siri Bartusch
(VLT 1/4 1975)

Esperanto- möten i Sverige

Sex gånger under våren och sommaren ordnas större esperanto-arrangemang i Sverige.

Halmstad

I Halmstad har Esperantoförbundet sin årskongress 17—19 maj (pingsten). Information om årskongressen finns i de senaste numren av La Espero.

Jönköping

Den internationella kristna esperantorörelsen (KELI) håller sin kongress i Jönköping veckan före världskongressen i Köpenhamn. Anmälan till Birgitta Ahlrén, Högbergsgatan 31 A, 116 20 Stockholm.

Anmälningsavgift 25:—, postgiro 9 14 39-0.

Vårdnäs

Trots att Kristliga Esperantoförbundet är fullt sysselsatt med att ordna

KELI-kongress i Jönköping, hinner man med att ordna årskonferens den 1—4 maj på Stiftsgården i Vårdnäs.

Göteborg

Del 2 av efterkongressen, alltså efter kongressen i Köpenhamn, ordnas i Göteborg. Anmälan till Postkongressen de esperanto, Box 55028, 400 53 Göteborg.

Kalmar

Arbeter-Esperantoförbundet träffas för årsmöte i Kalmar 24—25 maj. Anmälan till Nils Kindgren, Vintergatan 8 A, 381 00 Kalmar.

Skåne

Till Skåne går en av heldagsutflykterna från världskongressen i Köpenhamn. Man besöker Malmö, Lund och slottet Svaneholm.

ORDBOKEN

Vi väntar alla på den nya svensk-esperantiska ordboken, som Ebbe Vilborg arbetat med i många år. Att trycka böcker är dyrt och särskilt ordböcker. För att sänka försäljningspriset på ordboken beslutade SEF förra årsmötet att samla in pengar till en särskild ordboksfond.

Till fonden kommer pengar dels genom gåvor (flera har skänkt 1 000 kronor) och dels genom försäljning av klistermärket Amikeco trans limoj (3 kronor kartan). T. o. m. mars 1975 har insamlats 12 077 kronor. Ytterligare medel behövs och kan när som helst sättas in på SEFs postgirokonto 20 12-3. Skriv ordboken på talongen.

Plats för "Komencanta paĝo"

I ett av höstnumren av La Espero kommer vi att bereda plats för en "Komencanta paĝo".

Där har vi tänkt att nybörjarna själva ska få stå för innehållet. Till exempel kan kurserna ägna en hel eller två halva lektioner åt att förbereda ett bidrag till sidan. Vi tror att det går att kombinera med det vanliga kursarbetet, så att bidraget blir en övning i att använda esperanto. Vad kan bidraget bestå i? Gruppen bör själv diskutera fram vad de vill göra, men här är några förslag:

Korsord
Hur vi blev esperantister: intervju med varandra
Då hade jag behövt esperanto: någon upplevelse
En gemensam dikt
En presentation av gruppen själv, vad de jobbar med osv.
Argument för och emot kärnkraft (eller miljövård...)
Så här tycker vi att man kan jobba för esperanto
Horoskop
Matrecept

Bidraget bör inte vara längre än en A 4-sida eller motsvarande. Illustration får gärna bifogas.

Sänd bidragen så snart som möjligt! Adress: Åke Blomberg, Lidåkersgatan 6 C, 531 00 Lidköping.

Redaktoro:

La redaktoro estas devigita forveturi eksterlanden je la finarangado de tiu ĉi numero de La Espero, kaj tial Franko Luin grandparte respondecas pri la aspekto de nia gazeto, sed tio certe nur utilos al ni. Mi tamen devas peti pardonon al tiuj, kiuj skribis leterojn al la redakcio, ĉar pro multe da laboro mi ne havis tempon zorgi pri la korespondado.

Västerås, kie nuntempe laboras unu el niaj plej aktivaj grupoj, faris dum la aŭtuno enketon pri la lingva problemo. Tiu enketo, je kiu oni direktis certajn demandojn al la ĉeestantoj je publikaj kunvenoj, en diversaj loĝkvartaloj kaj en laborejoj, ja ne estas science aranĝita afero, sed ĝi tamen estas interesa.

Oni konstatas, ekzemple, ke 56 % preferas la anglan lingvon kiel solvon de la mondlingva problemo. Vere, tio estas plimulto, sed konsiderante la fortan propagandon por la angla lingvo en nia lando, tiu cifero estas surprize malalta. 60 % estas favoraj al la ideo pri unu sola dua lingvo por internaciaj kontaktoj, kaj nur 17 % trovas tiun ideon utopia.

Nur 29 % opinias ke politika neŭtraleco estas grava por internacia lingvo. Tio montras ke homoj ĝenerale ne kunligas lingvon kaj politikon. El unu vidpunkto lingvo kompreneble estas same neŭtrala kiel mono, sed aliflanke la lingvo ofte estas uzata kiel pure politika batalilo. 49 % opinias ke la dua lingvo estu facile lernebla.

Sendube la homoj komencas konscii pri la lingva problemo. En Svedujo ni ja nuntempe renkontas ĝin ĉiutage en la interrilatoj kun niaj gastlaboristoj kaj iliaj familioj. La sinteno rilate al esperanto ĝenerale ne estas malfavora, sed oni estas skeptika pri la praktika utileco de nia lingvo. Malmultaj volas lerni lingvon nur pro idealistaj motivoj; oni deziras havi tujan praktikan utilon de la lernado, kaj multaj imagas al si, ke tion oni havas se oni lernas la anglan lingvon. Nia tasko estas konvinki la publikon, unuavice ke la angla lingvo fakte ne sufiĉas por internaciaj kontaktoj, duavice ke esperanto vere donas utilon. La praktika uzado de nia lingvo en diversaj kampoj tial estas ege grava — same grava, eble, kiel la informado.

Agrablan someron al vi!

Åke Blomberg

Esperanto i pressen

Lära sig åtta språk?

"Det är inte meningen att alla människor skall tala esperanto till vardagslag", säger Herbert Lindros i en smålandstidning. "Det skall inte bli allas modersmål utan i stället ett 'brodersmål' att användas i internationella kontakter mellan människor och länder. Det finns i dag omkring 3 000 olika språk, och det är omöjligt att lära sig allihop. Om en svensk lär sig åtta språk, t. ex. engelska, franska, tyska, spanska, portugisiska, italienska, ryska och polska, skulle han ändå inte kunna tala med mer än 30 procent av alla människor. För att kunna tala med alla behöver vi ha ett språk gemensamt och det är där esperanto kommer in."

Hålla vid liv

"Vem vill hålla esperantokunskaperna vid liv tillsammans med mig?" frågar en annons i Svenska Dagbladet. Den annonsen och några andra gör reklam för att man skall annonsera i tidningen.

Det finns böcker

"Finns det böcker på esperanto?" Den frågan ställer Helsingborgs Dagblad till Kurt Strömberg, och han talar om att det finns böcker av en rad kända författare. Han fortsätter: "Vad det gäller läroböcker har just nu en ny och mycket lättfattlig bok kommit ut. Den är i helt modern tappning och så enkelt upplagd att man i stort sett bara behöver kunna alfabetet för att klara av det mesta innehållet."

Fin ironi

Samma tidning citerade tidigare i år ur Esperantonytts artikel om missförstånd på engelska. Man avrundar med en liten knorr: "Naturligtvis skriver inte Esperantonytt om dessa språkliga grodor för ros skull. Naturligtvis har man en metod att undvika dom. Naturligtvis går metoden ut på att man ska lära sig esperanto, världens lättaste språk, enligt uppgift. Nu faller det ju oss in, att det finns en liten hake, och det är att så få människor talar esperanto. Men annars är det säkert alldeles utmärkt. Hasta la vista, amigos (fast det är förstås spanska — esperanto kan vi inte)."

Har du tänkt?

"Vad som i första hand brister här i Sverige är undervisningen", säger Sigurd Olsson till Kronobergaren, och tidningen berättar att han "vill gärna till undervisningsminister Lena Hjelm-Walén ställa frågan: Hur har du tänkt dig att lösa världsspraksproblemet?"

Rotary-föredrag

Fotograf Johan Lindholm höll föredrag om esperanto för Hässleholms Västra Rotaryklubb, och Norra Skåne rapporterar att "Esperanto är egentligen mer än bara ett språk, det är en internationell organisation med kontakter överallt, det är helt enkelt en livsstil."

Fönstret

Som svar på ett brev från Runo Stridell skriver Fönstret att "det har alltid varit goda kontakter mellan ABF-avdelningar och esperantoföreningar och under årens lopp en tidvis livlig studieverksamhet. Men tyvärr är det numera så att intresset för att studera esperanto inte är särskilt omfattande. Under det senaste verksamhetsåret finns inom ABF 36 studiecirkel med sammanlagt 293 deltagare." Fönstret ger också kommentaren "Det aktiva arbetet för användning av esperanto kan ABF inte påverka. Det arbetet sköts av esperantorganisationerna."

Flera språk konkurrerar

"Ett nationellt språk är aldrig bra som internationellt språk", skriver Sökaren i inledningen till en intervju med Franko Luin. Sökaren gör en genomgång av de viktigaste världsspråken — engelska, franska, ryska, spanska. "Varje tungomål som utbreder sig över världen för också med sig åtskilligt av ursprungslandets speciella kultur och tänkesätt."

Klippt av Ulla Luin

Har du en ledig säng?

Pasporta Servo är ett initiativ av TEJO, esperantoundomens världsförbund, och startade förra året. Man vill ha s. k. esperantovärdar, som i sina hem eller på annat sätt kan ta emot gästande esperantister under en eller flera dagar. Avsikten är att gästen inte skall behöva betala någonting för logi, men efter överenskommelse en del för enkla måltider.

Tanken är naturligtvis att man på det sättet skall komma i kontakt med utländska esperantister och få tillfälle att tala esperanto. De utländska gästerna å andra sidan får kontakt med svenska hem och kan skaffa sig en djupare kännedom om det svenska samhället än vanliga turister i allmänhet kan få.

Förra året var ett 40-tal esperantovärdar i olika länder registrerade, och i år har det antalet utökats till ett 100-tal. I Sverige är antalet ännu på tok för

Nog hinner du fram till Köpenhamn!



Än finns det tid att anmäla sig till årets världskongress i Köpenhamn. Men tiden bara rinner iväg och snart är anmälningsavgiften högre igen.

Köpenhamn! Behöver den så många ord i presentation? Och så nära! Det lär ta flera år innan vi får en ny världskongress alldeles inpå knuten.

Rusa iväg med din anmälan i dag. I La Espero 1/75 hittar du allt du behöver veta om avgifter och kongressen.

litet, men så har också institutionen just kommit igång, och man får hoppas att flera anmäler sig.

Är du nyfiken och vill pröva på?

För ca 8:— kronor kan du få en broschyr som samtidigt blir ett medlemsbevis (du kan givetvis utnyttja Pasporta Servo vid dina egna utlandsresor, och det skall du göra). Skriv till Wim Posthuma, Soldatgatan 40, 723 45 Västerås (sänd inga pengar ännu). Se till att vårt land blir väl representerat!

CITAT

Highbrow!

Rasande professionell är Viveca Lindfors, som i lördags gestaltade kvinnoröster från världsdramatik och tidningsintervjuer i "I am a woman".

Ambitionen att presentera denna kvinnomålning på porlande engelska för en svensk publik skulle av en illvillig person lätt kunna upptas som nonchalans mot sagda publik. Speglande en attityd som för några år sen kallades highbrow. Alla är inte så slängda i engelska.

Västmanlands Läns Tidningar

Bristfälligt

Bristfälliga kunskaper i fundamentala ämnen som språk och matematik har sedan länge påtalats från näringsliv och högskola. Vid Skolveckan talades rent ut om en ny analfabetism: tusentals ungdomar lämnar skolan utan att kunna i praktisk mening läsa och skriva sitt eget språk.

Svenska Dagbladet

Tolkar och poliser

En strid har blåst upp kring tolkning vid förhören hos Södertäljepolisen. Stadens auktoriserade tolkar förklarar att de speciella tolkar som polisen använder har forcerat fram erkännanden som inte är riktiga. Kvaliteten hos svenska polisens tolkar är emellertid ett rikspöblem.

Dagens Nyheter

Både svenska och engelska

Fråga Kvällsgymnasiet vilka som är flitigast! Studenterna från tredje världen! Och vad får de läsa?

Svenska och engelska. För att alla kunna studera.

De måste klara båda språken, annars klarar de ingenting.

Dagens Nyheter

Malmö eklaboris en nova klubejo



Kiel ni menciis jam en la pasinta numero de La Espero, la klubo en Malmö luis novan, pli belan kaj pli modernan klubejon. Ĝi konsistas el du ĉambroj, inter kiuj unu estas biblioteko kaj oficejo kun telefono ktp. kaj loko por estrarkunsidoj. La alia ĉambro taŭgas por kunsidoj, festaj aranĝoj, kursoj. Krome kuirejo, arkivejo, vestejo. Jam dum pli ol 45 jaroj la klubo luas propran klubejon.

La bildo montras la grandan klubĉambron, sed ĝi estus multe pli interesa, se estus ankaŭ kelkaj klubanoj en la ĉambro, ĉu ne?

SEF AKTIVIS EN 1974

Plia agadjaro finiĝis, 1974, kaj la estraro de SEF pretigis raporton pri tiu jaro. Kiam oni legas ĝin, oni denove rimarkas, ke la esperanto-agado en Svedio daŭre dependas de la agado de la kluboj: de ili ĉefe dependas la informa laboro, ili organizas kursojn, prelegojn kaj kunvenojn. La tasko de la estraro pli kaj pli fariĝis servi al la kluboj, plifaciligi ilian laboron.

Pluraj kluboj kontaktis lernejojn en siaj lokoj kaj prelegis en ili pri esperanto, kio iuloke eĉ rezultigis kurson.

Du novaj kluboj fondiĝis dum 1974 kaj aliĝis al SEF: en Kramfors kaj studenta klubo en Uppsala. Tio estas

jam la tria sinsekva jaro, kiam novaj kluboj fondiĝis. SEF havas nun 52 funkciajn klubojn.

Ĉu vi scias, ke SEF dum la lasta jaro eĉ povis noti kreskon de sia membraro? La kresko estis minimuma, sed tamen ĝojiga. Ĉirkaŭ cent novaj membroj aliĝis al la asocio, sed preskaŭ same multaj forlasis niajn vicojn.

Ankaŭ la ekonomio estis iomete pli bona ol dum kelkaj antaŭaj jaroj, ĉefe pro ŝparado je la kosto de La Espero kaj pro kelkaj grandaj donacoj, kiuj eniris la ĝeneralan kason. Heredaĵo ebligis eldonon de nova lernolibro "Ek!", kiu vendiĝas en librovendejoj kaj estas havebla en preskaŭ ĉiuj bibliotekoj.

La biblioteko de SEF estas jam en sufiĉe bona ordo. Post la pluraj translokiĝoj la libroj tute miksiĝis kaj la nova bibliotekisto, Derk Dam, havis kaj ankoraŭ havas multe da laboro por fari ordon inter ili.

Nova broŝuro aperis tuj antaŭ la lasta jarkunveno de SEF kaj ĝi estas jam elĉerpita. Ĝi estis traduko de broŝuro de Itala socialdemokrata partio pri ĝia starpunkto pri esperanto. La broŝuron ricevis svedaj politikistoj kaj politikaj kaj sindikataj organizaĵoj.

SEF dum 1974 plurfoje aŭdigis sian voĉon eksteren: okaze de la dissendo de la broŝuro de la italaj socialdemokratoj, per eldirono kontraŭ plia angliĝo de la sveda lerneja sistemo kaj okaze de apero de la lernolibro "Ek!". Ne ĉiam niaj paŝoj donis la deziratajn rezultojn, sed ili kutime ne restis senĉaj.

Plua paŝo estis farita favore al eldono de nova sveda-esperanta vortaro, per lanĉo de monokolekta kampanjo por subvencii ĝian eldonon.

La estraro ekdiskutis dum la jaro du grandajn projektojn: organizon de Universala Kongreso en Svedio fine de tiu ĉi jardeko kaj eblecon organizi lerneajn eksperimentojn en Norda Eŭropo. Ĝi ankoraŭ ne prenis starpunkton pri la realigo de tiuj ĉi projektoj.

Franko Luin

1975: BONA KOMENCO

NOVAJ MEMBROJ

En la unuaj tri monatoj de 1975 registriĝis proksimume 50 novaj membroj de SEF. Tio estas iom pli ol en la sama periodo en 1974.

La kluboj de Hallsberg, Malmö, Norrköping, Uppsala, kaj Gävle estas videblaj plurfoje en la listo. Sed estas ankaŭ rimarkeble ke pluraj novaj membroj pagis sian unuan kotizon rekte al SEF, ne nur tiuj kiuj loĝas longe for de klubo, sed ankaŭ tiuj kiuj havas klubon en sia proksimeco. Do, necesos por SEF starigi servon por informi pri tiaj membroj al la kluboj.

La alfluo de novaj membroj estas pli vigla je la komenco de la jaro. En normala jaro, duono el la novaj membroj venas en la unuaj tri monatoj. Komprenble iom varias laŭ la aktiveco de la klubaj kasistoj.

En normala jaro ankaŭ malaperas iom da malnovaj membroj, sed pri ili oni scias nur post la fino de la jaro.

200 KOMENCANTOJ

En la nuna studjaro 1974—75 ĉirkaŭ 200 personoj ekstudis esperanton laŭ la statistiko kiun kolektis SEF.

En la lasta aŭtuno oni dissendis pe-ton al la svedaj kluboj por kolekti la adresojn de la komencantoj. Al ĉiu adreso oni sendis informkoverton kaj 2 numerojn de La Espero.

La statistiko supozeble ne estas kompleta. 26 kursoj estas raportitaj, en 17 kluboj kaj 3 lokoj sen klubo, kaj krome korespond-studentoj.

Por la progresintoj oni ne havas similan servon, kaj tiuj kursoj ankaŭ ne estas enkalkulitaj en la statistiko. Sed eblas daŭre sendi liston pri

novaj komencantoj al la oficejo de SEF (Esperanto-Förbundet, Fack, 122 04 Stockholm-Enskede).

Ulla Luin

La kluboj raportas

Ni dankas por alvenintaj raportoj. En **Stokholmo** oni konstante informas pri esperanto en la centra stacidomo, kaj ankaŭ el **Hallsberg** venis raporto pri reklamo en la stacidomo. Laŭ mia opinio tio estas bona maniero informi alvenantojn pri la ekzisto de loka esperantoklubo.

La klubo en **Helsingborg** dum kelkaj semajnoj havis reklamon sur la urbaj aŭtobusoj, sed laŭ la raporto tiu metodo ne estis tro efika.

Informado plej ofte estas multekosta afero, sed en **Sundsvall** oni ĝuste nun senkoste disponas pri bona loko en la flughaveno. Tio estis ebla jene: pluraj vitraj montruoj estas liberaj, kaj dank' al persona bonvolo oni permesis al la klubo senkoste prunti unu el ili ĝis iu alia ĝin luprenos.

Helsingborg raportas ke oni aranĝis kurson en **Ängelholm**. Tiamaniere vigla klubo povas plivastigi sian agadon al proksimaj lokoj.

Nova klubo laboras inter la studentoj de **Uppsala**. La nomo estas SESU (Studenta Esperantosocieto de Uppsala), kaj por eksteraj kontaktoj respondas Christer Fernström, Rackarbergsgatan 84, 752 32 Uppsala.

En **Norrköping** dum la jaro kunvenis tri diversaj studrondoj, unu por komencantoj, unu por progresantoj kaj unu speciala rondo por gepensuloj.

Dank' al la prezentado de esperanto inter 70 geinstruistoj en la distrikto **Vikbolandet** oni ek de la aŭtuno 1975 havos ankaŭ esperanton en la plano por libere elektitaj temoj. Sub gvido de s-ino Kajsa-Britta Sandell, instruistino en Östra Ny, grupo de geinstruitaj fondis esperanto-studrondon en Vikbolandet.

El **Skövde** venas propono pri lote-rio inter klubanoj kaj gekonatuloj. La intenco estas ke unu aĉetanto abonu por ekz. ok lotoj je 20 kronoj. Lotumado okazu unufoje ĉiun monaton. Gunnar Mattsson, Länsmansgatan 9 A, 541 00 Skövde, pensis pri tiu afero kaj volonte respondos al viaj demandoj.

Specialaj aranĝoj okaze de la Semajno de Internacia Amikeco oni havis inter alie en **Malmö** kaj **Kramfors**.

Motala sugestas ke ni proponu al la turismaj oficejoj ke oni traduku la lokajn turismajn broŝurojn en esperanton.

La broŝuro de la italaj socialistoj rezultis en propono al la socialdemokrata partio en **Göteborg**. Ankaŭ en aliaj lokoj oni forte agadas por tio.

Tri membroj el la esperantoklubo de **Västerås** partoprenis debaton inter lingvoinstruistoj en **Enköping**. Inter alie ili laŭlegis la SEF-deklaracion kontraŭ la UKÄ-propono. En **Västerås** ni ankaŭ manifestaciis kontraŭ teatraĵo en kiu sveda aktorino por sveda publiko parolis angle. Alia manifestacio estis kontraŭ anglaj tekstoj en svedaj kantoj por la melodifestivalo.

En **Sundsvall** la agado en la lernejo evoluis bone. Multaj lernantoj aŭskultis kun intereso al prelegoj pri Japanio kaj pri esperanto.

Venontaŭtune la klubo en **Stockholm** projektas aranĝi esperantokspozicion en la bibliotekoj kaj samtempajn informkunvenojn por intereseitoj.

Salutas via

Gunnar Farm

40-jara jubileo

La Suda Distrikto de SEF aranĝis semajnfinan kurson en Malmö la 15-an kaj 16-an de marto. La aranĝo ankaŭ ampleksis la 40-an jarkunvenon. Ĉirkaŭ 50 personoj el diversaj lokoj, eĉ eksterdistriktaĵoj, partoprenis.

Cio estis bone aranĝita kaj fluis glate. La diversaj kunvenpartoj dum la unua tago okazis en la klubejo de la esperantistoj en Malmö. Tiu traf-punkto estis, se mi ne eraras, inaŭgurita antaŭ ĉirkaŭ 3 semajnoj. Ni vere gratulas al la klubo de Malmö.

Prelegantoj estis nia propra prezidanto Olle Olsson kaj unu el la eminentuloj de UEA, direktoro V. Sadler el Nederlando. Ambaŭ faris bonan laboron. S-ro Sadler komence de sia prelego en la sabata posttagmezo deklaris, ke estas lia unua vizito en Svedlando. Car li paŝis sur la svedan teron nur kelkajn minutojn pli frue li ankoraŭ ne alktimigis al la svedaj cirkonstancoj. Sed, iom anticipante la okazajojn, jam en la dimanĉa mateno lia scio pri la elparolaj eraroj de ni svedoj estis sufiĉe granda!

Post tranoktado en Hotel Silvers ni daŭrigis dum la dimanĉo en Hotelo Kramer.

Nur resume ni mencias kelkajn temojn: Ĝenerala superrigardo de la Esperanta gramatiko, Malfacilaĵoj en la gramatiko, Kelkaj reguloj pri elparolo, La historio de Esperanto kaj Aktualajoj en la Esperantomovado.

Ankaŭ la jarkunveno ŝajnis esti tre facila afero. La elekta komitato certe

faris treege bonan laboron. Preskaŭ monotoniĝis la frazo: "La elekta komitato proponas reelekton".

En "la kaftrinka kunestado" Karin Jarnberg, juna kantistino, agrabligris la atmosferon per kantado kaj muziko. Ester Andr n prezentis vere bonan prozan rapsodion de la 40 jaroj.

Sed, kiu  jo daŭras  ame? Nun ni  uj rehejmiĝis plenaj je novaj scioj kaj impresoj.

Minani denove prelegis

La juna studento Justin Minani el Burundi en Afriko faris novan rondvojaĝon en Svedujo kaj prelegis en diversaj lokoj,  efe en lernejoj kaj popolaltlernejoj. I. a. li restis du semajnojn en la stokholma regiono. Nia samideano Lennart  berg organizis lian vojaĝon kiel reprezentanto por G teborgs FN-f rening (la Gotenbarga societoto por la Unuiĝintaj Nacioj).

La veturoj kaj prelegoj de Minani ne estas unuavice propagando por esperanto. Li batalas por sia popolo, malgranda, malriĉa gento, kiun la nunaj regantoj en lia lando simple provas ekstermi. Iliaj lingvo kaj kulturo estas detruataj kaj la homoj krude murdataj. Minani mem perdis preskaŭ sian tutan familon je la popolmurdoj, kiuj okazas en lia lando. Nur iuj onkloj troviĝas en kampoj por rifuĝantoj en Tanzanio kaj aliaj najbaraj landoj. Minani esperas, ke multaj svedoj subskribos la peticiajn listojn kiuj nun estas prezentataj en Svedujo. Unu estas direktita al la ĝenerala sekretario de UNO, Kurt Waldheim, la dua al la sveda ambasadoro  e UNO, Olof Rydbeck.

La prelegoj okazas en esperanto, kaj Lennart  berg interpretas. Esperanto estas ankaŭ la lingvo uzata je la postaj diskutoj, kiam la aŭskultantoj rajtas fari demandojn al Minani.

Tio estas esperanto praktike uzata. Kiel esperantistoj ni havas gravajn motivojn defendi la rajton kaj kulturon de la malgrandaj popoloj, kaj se nia lingvo povas esti uzata por tiu celo, tio certe tute harmonias kun la intencoj kaj esperoj de la kreinto de esperanto, d-ro Zamenhof mem.

Justin Minani ĵus reveturis al Francujo por en la Universitato de Lion fari sian doktoran disertacion pri la sveda lerneja sistemo, la fundamenta lernejo. Dum la aŭtuno li revenos al Svedujo por daŭrigi tie siajn studojn.

SAT kongresos en Hago

En Hago, Nederlando, okazos venontan someron unikajo. Tiam S.A.T. (Sennacieca Asocio Tutmonda), Mondorganizo de Laboristaj Esperantistoj, aranĝos sian 48-an internacian Esperantokongreson de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1975 en la kongresa konstruaĵo "Op Gouden Wieken", adreso Scheveningsweg Hago. Al la jam starigita honorkomitato ĝis nun membriĝis: Mag. Marijnen, urbestro de Hago, D-ro A. Vondeling, prezidanto de la Dua Ĉambro de deputitoj, D-ro W. Drees Sr., Honorministro de Nederlando (esperantisto), Mag. M. Vrolijk, provinestro de Sudholando kaj ankoraŭ aliaj eminentuloj el  uj tavoloj de nia popolo. Ni atendas proksimume 400 vizitantojn el dudek landoj de la mondo. La urba konsilantaro akceptos oficiale la kongresanaron.

En la programo estas antaŭviditaj: Solena malfermo de la kongreso kaj salutoj de la diversaj nederlandaj aŭtoritatoj, de nederlandaj laboristaj asocioj kaj de eksterlandaj reprezentantoj. Krom la laborkunsidoj, en kiuj oni pritraktos la vivon, gvidadon kaj agadon de la Asocio, oni prezentos teatraĵojn en la internacia lingvo, okazos prelegoj pri diversaj temoj, oni projektis diversajn ekskursojn kaj multajn aliajn distriĝojn.

Sekretario de la 48-a SAT-Kongreso: J. Kuypers, Lombardkade 85-B, Rotterdam — 3001, Nederlando. Tel. 010-14 90 03.

Programo:  u ni havas ian?

La respondo povas esti senrezerva: jes! Niaj unua kaj dua  efroj kiel organizitaj esperantistoj estas **Informi** pri la internacia lingvo kaj **Instrui** ĝin. Sed, ni havas ankoraŭ trian rolon, tre grandan. Nome, **Praktike apliki Esperanton**.

En Unesko, kun kiu UEA havas Konsultajn Rilatojn pro sia aliĝo al

Unuiĝintaj Nacioj (UN) kiel t. n. ne-registara organizaĵo interne de la UN-organo EKOSOC (Ekonomia kaj Sociala Konsilantaro), nun evoluas aparta lerneja projekto internacia. Oni elektis proksimume 900 lernejojn en 63 landoj kun celo akceladi la internacian edukadon por interkompreniĝo. Pri la detaloj vi certe povos atendi informojn en viaj Esperanto-organoj, espereble ankaŭ en Revuo Esperanto de UEA.

Ni esperantistoj devus atenti tri  efajn temgrupojn de tiuj Uneskolernejoj: 1) studoj pri fremdaj popoloj kaj kulturoj, 2) Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj 3) UN kaj ĝiaj specialaj organizaĵoj. Jes, ni opinias, ke ni en tiuj studoj trovas bazon por nia supre menciita **tria rolo**.

 iu esperantisto, kiu jam konas sufi e bone la lingvon, devas ankaŭ apliki ĝin,  u ne? Alie la studlaboro estas forĵetita, kaj la scio de la lingvo iom post iom forvelkas. Tial ni — en niaj kluboj — trovu la ĝustan medion por studgrupo pri la tri bazaj temoj de la internacia politiko. Atentu! Ne timu pri la neŭtraleco de Esperanto; ĝin vi ne riskas, se vi uzas la lingvon kaj per ĝi studas la efektivajn temojn de la mondo, en kiu ni vivas!

Ni rekomendas al la novaj Komisionoj de UEA bone enpenetri tiun  i proponon; principe ĝi tuŝas  iujn komisionojn. Sekvu ellaboro de studplano, kiu cetere estu tia, ke oni havu eblecon adapti ĝin al la cirkonstancoj en  iu aparta lando.

Nur se ni mem preparas nin por la mondo, la mondo certe atentus nin kaj la internacian lingvon Esperanto.

INTER — Agadgrupo por Esperanto
Lennart  berg

Migrado en svisa alparo

Migremuloj atentu!  u vi jam aŭdis pri  ena migrado? Ne? Kun sia tuta havaĵo oni migras de unu loko al alia, trans montpasejojn, apud lagoj, en arbaroj, de unu kabano al alia, kun la plej bela aŭ spite al la plej aĉa vetero. Tia  ena migrado okazos  ijare de la 4a ĝis la 9a de aŭgusto en la Berner Oberland. La partoprenkotizo, inkludante trajn-, bus-, kaj telferbiletajn, komunajn manĝojn kaj trinkaĵojn same kiel la loĝadon, estos inter 160.— kaj 220.— frankoj svisaj (laŭ aĝo kaj profesio) por la tuta restado. — Krokodilado ne dezirata. — Se vi deziras ricevi pliajn informojn aŭ aliĝilon, skribu al: Somera Migrado SEJ, Rue de la Cude 5, CH-2035 Corcelles, Svisio.

Kelkaj forlasis nin

CHARLES HEDKVIST

La prezidanto de la Blindula Asocio, honora doktoro pri medicino, Charles Hedkvist mortis la 14-an de aprilo 65-jara.

Li fariĝis blinda jam kiel suĉinfano kiam liaj okuloj difektiĝis pro troa sunlumo. Li edukiĝis en la ordinaraĵoj okupoj por blinduloj, korboplektado kaj brosfarado, sed post kvinjara laboro en tiuj metioj li 1934 komencis studi ĉe Beskowska skolan kie li ankaŭ lernis Esperanton sub gvido de la rektoro de la lernejo, Sam Jansson. Jam 1937 li faris sian abituriantan ekzamenon.

Dum la milito ĝis 1947 li deĵoris ĉe la ministerio pri eksterlandaj aferoj kiel radioaŭskultanto, pri eksterlandaj disaŭdigoj.

Oni elektis lin sekretario de la Blindula Asocio 1942 kaj depost 1957 li estis ĝia prezidanto kaj direktoro. Vere gravan kontribuon li faris kiam li startis la grandan kolektan laboron por akiro de mono por la granda projekto la "parolanta libro".

Hedkvist ankaŭ kontribuis al la evoluado de teknikaj helpiloj por nevidantoj kaj depost 1954 li apartenis al la teknika komitato de la Mondkonsilantaro de la Blinduloj. De 1969 ĝis lastjare li estis prezidanto de la Mondkonsilantaro.

Ne nur niaj nevidantaj amikoj, sed ankaŭ ni esperantistoj perdis bonan gvidanton kaj amikon.

BĀ

BERTHEL KARSMO

Oficisto Berhel Karsmo, Lidköping, mortis, 50-jara. Flanke de sia ordinara laboro li estis talenta desegnisto. Kvankam ne esperantisto li faris de kelka tempo multajn desegnaĵojn por La Espero, ĉefe por nia rubriko Ere — parkere.

GÖSTA BOLANDER

Gösta Bolander, Nybro, mortis 76-jara. Li havis grandan intereson por internaciaj demandoj kaj estis tre aktiva ano de la esperanto-societo en Nybro.

K. L. NILSSON,

membro en Karlskrona Esperanto-klubo, mortis la 27an de januaro 1975. Li estis unu el la plej maljunaj membroj en la klubo, kaj li multe interesiĝis pri la Esperanta laboro. Ni en la klubo sentas la perdon de la bona amiko.

M.

Nobelpremio al aŭstro

Pasis tuta jaro ekde kiam, okaze de svedaj gastkoncertoj en Vieno, ni parolis la unuan fojon pri — ĉefe historiaj — rilatoj inter Svedio kaj Aŭstrio.

Kaj nun, post tiel mallonga intertempo, ni denove povas atentigi pri tutaktuala aŭstra—sveda okazaĵo: la Sveda Akademio de la Sciencoj aljuĝis la Nobel-premion 1974 por Ekonomio al la sveda esploristo Gunnar Myrdal kaj al la aŭstra profesoro Friedrich Hayek komune.

La 10an de decembro la sveda reĝo,

Karlo la Dek-Sesa, solene transdonis al ili la — por profesoroj certe konsiderindan — sumon de pli ol du milionoj ŝilingoj, laŭ aŭstria monvaloro.

Profesoro Hayek, nun en sia 76a vivojaro, naskiĝis kaj doktoriĝis en Vieno, kie li estris, dum kvar jaroj, ekonomian esplorinstituton kaj prelegis samtempe pri ekonomio kaj statistiko kiel docento en la universitato. Poste li pasigis 40 jarojn, malproksime de sia hejmurbo, en Londono, Norda Ameriko kaj fine Freiburg en Breisgau, ĉie kiel universitata profesoro de la ekonomiaj kaj sociaj sciencoj. De kvin jaroj li vivas denove en Aŭstrio, tamen ne Vieno, sed en Salzburg.

Liaj ŝtatekonomiaj kaj socialfilozofiaj doktrinoj estas liberaj, do — kompare al tiu de lia sveda kolego Myrdal — konservativaj. Ĉar Myrdal pledeas por laŭplana ŝtatekonomio, dum Hayek, analizinte la potencojn, kiuj detruis la liberan homan kunvivadon, atingis kontraŭan starpunkton.

Fame konata fargis lia libro "La vojo al sklaveco", en kiu li diras: "Neniam ni povos malebligi misuzon de la potenco, se ni ne volas, ke la potenco estu limigata en maniero, kiu jen kaj jen povus malhelpi ties aplikon eĉ por bonaj celoj".

La premio por ekonomio ne apartenas al la originaj Nobel-Premioj, dediĉitaj, komence de nia jarcento, de Nobel mem. Fondis ĝin, antaŭ nur ses jaroj, la Sveda Ŝtatbanko honore al sia tricentjara ekzistado kaj ankaŭ memore al la granda sveda scienisto Alfred Nobel.

Aljuĝante la premion al Hayek kaj Myrdal, la Sveda Akademio de la Sciencoj konstatis, motivante sian decidon, ke "ambaŭ pruvis sian kapablon, trovi novajn kaj unikajn vojojn al la formulo de problemoj kaj la prezentado de novaj intersekvoj de ideoj".

Dr. Karl Beckmann, Wien

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

Lernu per la eraroj

La frazo: "Esperanto povas venki (?) sian batalon" estas malĝusta.

Laŭ Plena Ilustrita Vortaro "venki" signifas "Superi malamikon en batalo, milito": Mi venkis ĉiujn kvin atakantojn (Z). La venkitajn reĝojn li alkatenis al sia kaleŝo (Z).

"Batalo" = Malamika interpuŝiĝo inter du hom(grup)oj, aŭ armeoj.

"Gajni" = Superi la alian partion. Gajni la ludon, la veton, la militon.

La ĝusta esprimo estas: "Esperanto povas gajni (!) sian batalon."

*

La frazo "Mi povas permesi (?), ke vi ricevos memorindan vojaĝon." estas malĝusta.

Laŭ PIV "permesi" signifas: Konsenti, ke iu libere faru ion: Permesu al mi kisi vian manon (Z).

"Promesi" signifas: Certigi, ke oni faros aŭ donos. Donu al mi la libron, kiun vi promesis al mi (Z).

Do la ĝusta frazo estas: "Mi povas promesi, ke vi ricevos memorindan vojaĝon."

T. M.

VENONTA NUMERO

Limdato por manuskriptoj:
15 de junio.



Pris kronor 195: — inklusive moms och försändelsekostnader från ESPERANTOFORLAGET, Fack, 200 42 Malmö 7

Esperanta arbo

*Vi Esperanto internacia
la verda arbo nia,
planto de lingva botanikisto,
Zamenhofo la ĝardenisto.*

*Post naŭdek-jara evoluo bona
Vi restas ĉiam fruktodona.
Vi etendas la branĉojn
en ĉiujn landojn
kaj semas grajnoj
en ĉiujn popolojn.*

*Vi kreas la premison
kaj la intereson
por translima korespondo
en la tuta mondo:
svedo — japano
finno — hispano
izraelo — italo
rumano — portugalo
hindo — belgo
soveto — anglo*

*Fariĝas Esperanto
amikeckreanto —
eĉ iam edzperanto.*

Jim Hornö

ANONCO

26-jara konstruteknikisto. Interesiĝas ankaŭ pri turismo kaj akvariismo. Jerzy W. Wojtakowski, P. O. Box 671, PL 50-950 WROCLAW-2, Polando.

Boken Du inte kan undvara

Esperanto en perspektivo innehåller esperantoförbundets hela historia, alla fakta om språket och rörelsen och om dagens situation. En unik uppslagsbok men samtidigt en spännande skildring som du läser med spänd uppmärksamhet.

Av Ivo Lapenna (chefredaktör), Ulrich Lins och Tazio Carlevaro.

RAPIDE

ASTRID LJUNGBERG 75-JARA

La 26-an de majo Astrid Ljungberg, ŝatata membro kaj mastrino de Stokholma KELI kaj grupo Esperantista de Stockholm, fariĝos 75-jara. Ni kore gratulas!

RADIO VIENO

iom ŝanĝis siajn horojn por la esperantaj elsendoj. Okazas nun mallongde ĉiun sabaton je la 17.45 horo kaj dimanĉon 06.45, ondolongo 48,74 m. Mezlonga ondo: ĉiun kvaran sinsekvan mardon (27/5, 24/6 ktp) je 203 m kaj horo 18.35.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack,
200 42 Malmö 7

Ejo: Möllvångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:
merkredo 10.00—11.00
jaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Poŝtgiro 578-5.

★

Administranto: Anna-Greta Strönne
Tel. hejma 040 / 12 92 11

Prez. Sven Sjöblom

La Espero

Svenska Esperantotidningen

Organ för Sv. Esperantoförbundet,
Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.
Hägervägen 31.

Postgirokonto 20 12-3.

Ansvarig utgivare: Bertil Akerberg.

Redaktör: Ake Blomberg, Lidåkersgatan 6 C, 531 00 Lidköping.

Tel. 0510-286 42 (arb. 0510-221 30).

Medlemsavgift för direkt medl. 25 kr, ungdom 10 kr, familjemedlem utan tidning 5 kr.

Prenumerationspris 25 kr.

Förbundets sekretariat är öppet
onsdagar kl. 18—20, tel. 08-48 99 76.

Sturetryckeriet AB - Stockholm 1975